

Ekzameno de Unua Grado (2006)

DIKTAĴO

PRI LA KOMERCA KORESPONDO

Ekzistas esencaj diferencoj inter la neafera, amika korespondo kaj la komerca. Dum en la unua oni klopodas havi stilon kiel eble plej variitan kaj personan kun lertaj agrablaj frazkonstruoj, en la dua la ĉefa kvalito estas mallongeco ligita kun precizeco, sen pretendo al literatura eleganteco.

En amikaj leteroj, fantazio povas ludi grandan rolon, en negocaj leteroj, fantazio ne povas nek devas ekzisti.

De tiuj diferencoj naskiĝas du tute apartaj skribmanieroj, kaj ofte okazas, ke lerta privata epistolisto ne estas kapabla skribi laŭnegece simplan aferan leteron.

Tradurre in esperanto:

1. Non mi piace quel cibo
2. Che cosa fai ?
3. Hai dimenticato l'orologio a casa?
4. Ascoltate mi!
5. I genitori andranno dal loro amabile figlio.
6. Venezia, e la città più magica del mondo
7. Come sta tua sorella?
8. Non capisco assolutamente nulla.
9. Venite precisamente alle undici e mezza
10. Quella signora nasconde la propria età.

Composizione (una a scelta):

1. Mallonga letero al via amiko por inviti lin travivi kune la venontajn libertempojn.
2. Mallonga letero al eldonisto proponante la eldonon de itala libro tradukenda en Esperanton.
3. Mallonga letero al onklino por havi novaĵojn pri ŝi kaj ŝia familio.

Ekzameno de Unua Grado (2008)

DIKTAĴO

La Filo (el "Fundamenta Krestomatio")

Malriĉa hebreo volis kristaniĝi. La pastro instruis lin pri la preĝo, sed lia penado restis vana, ĉar la hebreo estis tre malinteligenta.

– Nu, mia filo, se vi morgaŭ scios fari senerare la signon de la kruco, vi ricevos de mi sakon da terpomoj.–

En la sekvanta tago la hebreo prenis kun si sian filon, portantan sakon por la donaco, kaj li eniris en la domon de la pastro lasinte la filon en la korto.

– Nu, faru la signon del la kruco– diris la pastro.

– En la nomo de la Patro kaj de la Sankta Spirito. Amen.–

– Ne, kie do restis la "filo"?–

– Pardonu, via pastra moŝto, mi lasis lin ekstere; li tenas la sakon por la terpomoj.–

Tradurre in esperanto:

1. Oggi ho letto il giornale di ieri.
2. Che cosa vuoi?
3. Si mangia bene in quel ristorante?
4. Parlagli!
5. Non sono andato a scuola.
6. Quando andrai in città?
7. Non hai capito niente!
8. C'è solo una monetina nel mio portamonete.
9. È una bellissima ragazza, ma povera.
10. È meglio un uovo oggi che una gallina domani.

Composizione (una a scelta):

1. Scrivete un biglietto d'auguri a un amico che sta per sposarsi
2. Scrivete una richiesta di informazioni su un convegno esperantista
3. Segnalate a un vostro corrispondente che avete cambiato indirizzo.

Ekzameno de Unua grado (2009)

Diktaĵo:

Kelkaj kamparanoj sidis en vagonaro. Unu el ili metis sian ĉapelon sur benkon. Ĉe la sekva stacio envenis sinjoro, kiu senatente eksidis sur la kapveston. La posedanto furioze mienis. La sinjoro petis pardonon kaj proponis pagi la ĉapelon. La kamparano ne respondis.

“Se vi ne volas akcepti monon, mi pretas iri kun vi al butikoj, por aĉeti novan”, humile proponis la pekulo. La viktimo obstine silentas.

“Eble vi ne ŝatas iri nudkape! Prenu mian, ĝis ni aĉetis alian!”

Silento. Senespere la sinjoro rigardas ĉirkaŭe. Unu el la kamparanoj kompatis lin.

“Karlo”, li diris al sia amiko, “la sinjoro ja ne intence eksidis sur vian ĉapelon. Kaj li deziras pagi ĝin! Kial vi tiel obstine silentas? Kion do vi volas?”

“Mi volas sidi sur lia ĉapelo!” estis la venĝema respondo.

Traduzione in Esperanto:

1. Ĝi estas unu de la plej belaj tagoj.
2. Oni povas fari unu longan eskursionon.
3. Mi kredas, ke ni iros en aŭtomobilo.
4. En kiom da homoj ni estos?
5. Mi ne scias. Alkaj ne havas ankoraŭ decidita, kio fari.
6. Mi esperas, ke ĉiuj estos kontentaj.
7. Mi kredas, ke ĉiuj estos kontentaj nur tiuj, kiuj venos.
8. Ĉi kredas, se ni diras, ke ĉi tiu estas bone organizita?
9. Ne. Pro kio ni devus kredi?
10. Fari kiel vi volas.

Composizione (lettera, a scelta):

1. Respondite ad una lettera ringraziando per un invito che non potete accettare.
2. Scrivete alla vostra fidanzata esperantista,
3. Chiedete la spedizione di alcuni numeri di una rivista che non vi sono ancora pervenuti.

Ekzameno de unua grado (2010)

Diktaĵo:

Kiam mi maldormiĝis kaj malfermis la okulojn, ĉirkaŭ mi estis absoluta mallumo. Mi kelkajn sekundojn kuŝis senmove, penante klarigi al mi, kie mi estas. Ĉirkaŭe estis profunda silento. Mi miris, ke mi ne aŭdas la iradon de mia poŝa horloĝo, kiun mi ĉiam metas apud mia lito sur la noktan tableton, kaj mi eltiris mian manon por preni alumeton, sed mia mano tuj frapiĝis je la mureto. Tio ĉi forte min mirigis. Mi restis ankoraŭ kelkajn minutojn senmovo, penante kompreni, kie mi min trovas. Mi metis atenton sur tio, ke mi kuŝas sur io malmola kaj malglata: tio ĉi ne povis esti mia lito. Per maldekstra ŝultro mi ankaŭ sentis ion malmolan. Nenion komprenante, mi volis min levi kaj mi frapiĝis per kapo je la baro.

Traduzione in Esperanto:

1. Oggi mi sono svegliato molto presto.
2. Mi sono preparato bene.
3. Fuori pioveva.
4. Domani verrà mio zio.
5. Credo che sia l'unico zio che capisce l'esperanto.
6. Dove l'ha studiato?
7. È stato un buon allievo perché ha avuto un buon insegnante.
8. Mi ha dato una bella grammatica.
9. L'hai studiata?
10. Sì, e spero di avere un buon risultato.

Composizione (una lettera, a scelta):

1. Chiedete a un amico se può ritrovare un vecchio libro
2. Scrivete ad un albergo per rintracciare una borsa dimenticata.
3. Chiedete un indirizzo ad un Koresponda Servo.

Ekzameno de la Unua grado (2011)

Diktaĵo:

Esperanto estas facila, internacia lingvo. La iniciatoro de Esperanto estas Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Li prezentis la internacian lingvon en la jaro 1887.a. Ĉi tiu lingvo devas utili por la tuta homaro. Oni deziras, ke ĝi estu la dua lingvo por ĉiuj homoj. La homoj devas havi unu duan lingvon, kiu estu egala por ĉiuj. La homoj devas ankaŭ konservi sian propran nacian lingvon. Multaj personoj akceptis Esperanton. Multaj diversnacioj uzas ĝin. Sed oni devas ankoraŭ multon propagandi, por ke la tuta homaro parolu la duan lingvon Esperanto.

Traduzione in Esperanto:

1. Guardo dalla finestra.
2. Che cosa vedo?
3. Non è proprio una bellissima giornata.
4. Piove già. E pioverà tutto il giorno,
5. Avevo intenzione di fare una bella passeggiata con mia moglie.
6. Volevo camminare a piedi a lungo.
7. Mia moglie aveva intenzione di comperare qualcosa.
8. Pazienza. Aspetteremo un momento più adatto.
9. D'altra parte, non abbiamo alcuna urgenza.
10. Siamo ambedue in vacanza.

Composizione

1. Rispondete a un invito a cena.
2. Comunicate a un vostro corrispondente che avete cambiato indirizzo
3. Ringraziate per un regalo ricevuto.

Ekzameno de la Unua Grado (2012)

Diktaĵo:

La feino (el "Fundamento de Esperanto")

Vidvino havis du filinojn. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrino; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili.

La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.

Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna.

Traduzione in Esperanto:

1. Ĝi estas unu el la plej belaj tagoj
2. Mi legas unu el la plej bonajn librojn
3. Ŝi ne sciis, kio ŝi devas fari
4. Domani venos miaj svagoparentoj
5. Ĝi estis trankvilo kaj mi dormis
6. Bonan tagon, sinjorino.
7. Ĉu vi volas paroli kun mi?
8. Jes, mi volas paroli pri muziko
9. Ĉu venos iu ĉi vesperon?
10. Ni ĉiuj havas la saman opinionon.

Composizione

1. Invitate un persono al ŝanĝo de poŝtmarkoj
2. Prenote un ĉambro por viaj vakancoj
3. Ringraziate por un regalo ricevita

Ekzamenoj de Unua grado (2013)

Diktajo:

El "Zamenhof - Aŭtoro de Esperanto" de Marjorie Bulton

La paro, kies unuiĝo donis al la homaro Lazaron Ludovikon Zamenhof, ŝajnis strange malkongrua, kvankam la troveblaj atestaĵoj generale indikas, ke la geedzoj kunvivis harmonie kaj eĉ felice.

Marko Zamenhof ŝajnis esti tute intelekto, racio, laboremo kaj malvarmo; Rozalia Zamenhof, naskite Sofer, ŝajnis, male, amo, sentemo, sindediĉo, kompato kaj karitato, vere patrineca pacienco kaj intuicia komprenemo.

Kiam la unua infano, Lazaro, naskiĝis, la 15an de decembro 1859, Marko estis dudekdujara, Rozalia deknaŭjara. La hejmo ĉe strato Zielona (Verda Strato), Bjalistoko, estis triĉambra apartamento, la supra etaĝo de malbela ligna dometo.

Traduzione in Esperanto:

1. Carlo è andato a comperare il giornale.
2. Questa sera vedrò un bel film.
3. Corri! Il treno è in arrivo.
4. Quanto costa il giornale?
5. Ci possiamo sedere su questa panca.
6. Quando lo vide ella arrossì.
7. Non so se ti ho ridato il tuo libro.
8. Mi dai un euro?
9. Domani andrò a visitare i nonni.
10. Il ragazzaccio rise.

Composizione (lettera, a scelta):

1. Chiedete informazioni su un libro che non riuscite a trovare.
2. Scrivete una lettera di protesta perché non avete ricevuto una rivista.
3. Declinate un invito ad una festa di nozze.

Ekzamenoj de Unua grado (2014)

Diktajo:

“Pri la neceso paroli Esperanton” el L. L. Zamenhof – Originala verkaro.

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukon. Esperantistoj, disĵetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj, kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian propran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj.

Kiam ili poste revenas hejmen, ili ne sole mem parolas pli pure, sed ili alportas modelon de bona parolado al tiuj, kiuj restis hejme. Tiamaniere la kongresoj reguligas la uzadon de la lingvo.

Traduzione in Esperanto:

1. Che cosa vuoi fare?
2. Voglio andare a fare una bella passeggiata.
3. Potrei venire con te?
4. Ti aspetto. Ma fai presto.
5. Farò il più presto possibile.
6. Ieri abbiamo fatto una lunga escursione.
7. La giornata era molto calda.
8. Se fosse stata meno calda, sarebbe venuto anche Carlo.
9. Domani andrò a visitare i nonni.
10. Sono i nonni più simpatici del mondo.

Composizione (lettera, a scelta):

1. Scrivete una lettera per chiedere della salute di un amico.
2. Fate gli auguri di buon compleanno ad un amico
3. Ringraziate per un invito ad una festa.

Ekzamenoj de la Unua grado (2011 por infanoj)

Dettato /Diktaĵo:

Letero el Tanzanio

Mi venis al la vilaĝo de miaj parencoj. Miaj avoj, miaj onkloj kaj miaj kuzoj vivas en la savano. Ili havas multajn zebuojn kaj gardas ilin tage kaj nokte, ĉar leonoj kaj similaj bestoj ŝatas manĝi zebuojn.

Mi havas alian onklon ĉe la marbordo. Ankaŭ lin mi dezirus viziti. Mi povus iri kun la fiŝistoj por kapti fiŝojn. Oni diras, ke tie sur la marbordo estas belegaj konkvoj. Mi ŝatus kolekti multajn el ili.

Estu sana kaj havu multe da ĝojo! Tion bondeziras al vi via afrika amiko, Sumbu, el Tanzanio

Traduci in Esperanto:

1. Ieri ho letto la tua lunga lettera.
2. Raccontami del vostro viaggio in Africa.
3. Che cosa avete visto in quel lontano continente?
4. Dove avete incontrato il vostro amico Sumbu?
5. Siamo stati nel suo villaggio due settimane.
6. La savana è molto bella.
7. Purtroppo l'acqua dei pozzi vicini al villaggio non è sempre potabile.
8. Spesso nella casa manca la luce elettrica.
9. Non tutti i bambini possono andare a scuola.
10. Spesso i genitori non possono pagare la scuola per i propri figli.

Composizione (una lettera, a scelta):

1. Scrivi una lettera a un coetaneo straniero che ti chiede di corrispondere con lui.
2. Rispondi ad un invito a visitare il paese del tuo amico corrispondente.
3. Manda gli auguri di buon compleanno ad un amico che parla l'esperanto.

Ekzameno de Unua Grado (2016 – por infanoj)

Dettato /Diktaĵo:

Letero al mia afrika amiko.

Kara Jozefo,

mi estas lernanto de la kvina klaso de Verdello. Ĝi estas itala urbeto, kiu troviĝas en la kamparo inter Bergamo kaj Milano. En niaj kampoj ne vivas leonoj kaj elefantoj kiel ĉe vi, sed nur malgrandaj bestoj kiel birdoj, musoj kaj lacertoj. En la domoj de la kamparo estas ankaŭ bovoj, bovinoj kaj ĉevaloj. Mi loĝas en malgranda domo kun mia patro kaj mia patrino, mia avino Anna, mia fratino Simona kaj mia frateto Petro. En mia hejmo vivas ankaŭ mia katino, kiu havas du katidojn. Ili estas tre simpatiaj kaj ludas la tutan tagon. La nomo de mia katino estas Bonga kaj la du katidoj nomiĝas Pingo kaj Pango. Ĉu ankaŭ vi havas hundon aŭ katon?

Amike, Tonio.

Traduci in Esperanto:

1. Ieri ho letto un bel libro.
2. Oggi c'è l'esame di esperanto.
3. Domani non andrò a scuola perché è sabato.
4. Dove ho messo la mia penna?
5. Verrai a casa mia questa sera?
6. Non so se verrò perché devo scrivere una lettera al mio amico cinese.
7. Se verrò porterò con me il giocattolo che mi ha regalato mia zia.
8. Quando ero molto piccolo non andavo a scuola.
9. Perché non mi dici che cosa hai fatto ieri? .
10. Ieri pioveva e sono stato in casa tutto il giorno con mia sorella.

Composizione (una lettera, a scelta):

1. Scrivi una lettera a un amico straniero che vuole corrispondere con te.
2. Rispondi ad un amico esperantista che ti invita a visitare il suo paese.
3. Manda gli auguri di buon compleanno ad una tua amica che parla esperanto.